

De la Federación Española de Esperanto

# REVISTA

ANO 40 Nº 288 SEPTIEMBRE — DICIEMBRE 1988



**BOLETIN DE LA  
FEDERACION ESPAÑOLA DE  
ESPERANTO**

Directora: María Aurora Viloria

Dirección y administración  
Carreras Candi, 34 – 36  
08028 BARCELONA

**REDACTOR JEFE**  
Giordano Moya Escayola  
Balmes, 38. Tel. (93) 7881839  
08225 TERRASSA (BARCELONA)

**COMITE DE REDACCION**  
Vicente Hernández Llusera  
Gabriel Mora i Arana  
Andrés Martín González  
Luis Serrano Pérez  
Miguel Gutiérrez Adúriz  
Antonio Marco Botella

Jarabono . . . . . 1500 p-toj

**ENHAVO**

La kovrilo: La Estraro de Hispana Esperanto-Federacio kaj la Redakcio de "Boletín" deziras por ĉiuj HEF-anoj feliĉan Kristnaskon kaj Prosperan Novan Jaron 1989an!

**Paĝo**

49a Hisp. Kongreso de Esperanto . . .	3
Artaj kaj Sciencaj Horoj . . . . .	6
HEF Sidejo en Barcelono . . . . .	9
Pensoj de Zamenhof . . . . .	11
La U.K. en Rotterdam . . . . .	12
Paĝoj el la hispana beletro . . . . .	17
Lingva Problemo . . . . .	21

**UTILAJ ADRESOJ**

Hispana Esperanto-Federacio  
Carreras Candi, 34-36  
Tel. (93) 240 26 62  
08028 BARCELONA

**PREZIDANTO.** Salvador Aragay

**VICPREZIDANTO.** Luis María Hernández

**SEKRETARIO.** Víctor Ruiz

**VICSEKRETARIO.** Josep Miranda

**KASISTO.** Joan Font

Pagojn sendu al  
Caja de Pensiones para la Vejez y de  
Ahorros. Libreta núm. 2.303-26  
Agencia Riera Blanca, 436  
08028 BARCELONA

**JUNULARA SEKCIO (H.E.J.S.)**  
Jordi Ferré  
Apartado 23484  
E-08028 – BARCELONO

**FERVOJISTA SEKCIO (H.E.F.A.)**  
Ronda S. Antonio 46-50, 2º 4º  
08001 BARCELONA

**TURISMA SEKCIO KAJ ELDONA FAKO**  
kaj "FUNDACION ESPERANTO"  
Inés Gastón  
Pº de la Constitución 35, 4º  
5001 ZARAGOZA

**LIBRO-SERVO**  
Luis Hernández García  
Apartado 119  
47080 VALLADOLID  
Pagojn por LIBRO-SERVO  
Cuenta Postal 3.118.078 VALLADOLID

**ĈEFDELEGITO DE U.E.A. EN HISPANUJO**  
Juan Azcuenaga Vierna  
Gral. Dávila 127, portal 7, 2º izda.  
Tel. (942) 33 94 87  
Cuenta Postal 03548531  
39007 SANTANDER

**OFICEJO**  
Rodríguez San Pedro, 13, 3º P-7  
28015 MADRID

**INFORMA OFICEJO**  
Vakas

# 49a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

BILBAO, 17/22 JUL. 1989

## PROVIZORA LOKA KONGRESA KOMITATO

Grupo Esperantista de Bilbao — Barrenkale Barrena, 7 - 1º 48005 BILBAO

PREZIDANTO: José Luis Bringas Tellechea

VICPREZIDANTO: Julio J. Juanes Sáinz

SEKRETARIO: Iñaki Vélez Ortiz

KASISTO: Jesús Miguel García Iturrioz

KOMITATANO PRI PUBLIKAJ RILATOJ: Eduardo Larrouy López

KOMITATANO PRI KOMUNIKAJ MEDIOJ: Keti Sesmero Cutanda

KOMITATANO PRI KONGRESEJOJ: Tomás Apraiz Riberas

KOMITATANO PRI EKSKURSOJ KAJ BANKEDO: Teodoro Ibáñez Martín

KOMITATANO PRI LOĜADO: Frieda Van Houten

KOMITATANO PRI ARTAJ PROGRAMOJ KAJ PAROLADOJ: Julio J. Juanes Sáinz

KOMITATANO PRI JUNULARAJ PROGRAMOJ: Santiago Martín Relea

KOMITATANO PRI EKSPOZICIO KAJ LIBRO-SERVO: Iñaki Vélez/Jesús M. García

KOMITATANO PRI INFORMOFICEJO: Igone Manciles Marín

KOMITATANO PRI FILATELAĴOJ: Juan Liceranzu Ortega

## PROVIZORA PROGRAMO

- Lundo 17an** 17/19,30 h.: Inaŭguro de la E-ekspozicio (\*)  
Disdonado de la kongresdokumentaro  
20 h.: Interkonatiĝa vespero
- Mardo 18an** 10/12 h.: Oficiala malfermo de la Kongreso  
12,30 h.: Oficiala foto  
13,30 h.: Akcepto en la urbodomo. Lunĉo  
16/18,30 h.: Kunveno de la HEF-estraranoj kun Delegitoj de Grupoj  
16/18,30 h.: Senpaga gvidata piedirado tra la malnova parto de Bilbao ("La Sep Stratoj"). Vizito al la Bilbao-a Esperanta Grupo kaj al la Arkeologia Muzeo. (Nepa antaŭenskribiĝo)  
19/21 h.: Kastillingva prelego (\*)  
22/24 h.: Arta vespero kun projekcio de E-filmo  
Libro-Servo: 16/18,30 h.  
Ekspozicio: 16/19 h (\*)

- Merkredo 19an:** 10/12 h.: Publika kunveno de HEFS  
 10/11 h.: Infana kurseto de Esperanto gvidata de José Añó  
 10/12 h.: Artaj kaj sciencaj horoj  
 12,30/14 h.: Kolokvo pri "Nuna situacio de la E-movado kaj perspektivoj"  
 14,30 h.: Tagmanĝo  
 16 h.: Ĝenerala kunveno de HEF. Omaĝo al la fondintoj de la Bilbao-a Esperanto-Grupo en ĝia aktuala epoko  
 16/19 h.: Suprenirado al superurba monteto Artxanda (Nepra antaŭenskribiĝo)  
 20 h.: Vizito al "Sporta Klubo" por ĉeesti vaskpilkon ludon  
 Libro-Servo: 10/12 h. kaj 16/19 h.  
 Ekspozicio: 10/13 h. kaj 16/19 h. (\*)
- Ĵaŭdon 20an** 9/10,30 h.: Samtempaj fakaj kunvenoj  
 10,30/11,30 h.: Infana kurseto de Esperanto gvidata de José Añó  
 10,30/12,30 h.: Oficialaj ekzamenoj de ILEI kaj HEF pri lingvoscio kaj instrukapablo  
 10,30/12,30 h.: Artaj kaj sciencaj horoj  
 13/14 h.: Publika akto ĉe la strato Esperanto  
 14,30 h.: Tagmanĝo  
 16 h.: 12-kilometra senpaga ekskurso per ŝipeto tra la rivero Nervionio ĝis Portulageto kaj akcepto ĉe la tiea Urbodomo, fare de la Urbestro. (Nepra antaŭenskribiĝo)  
 18,30 h.: Reveno al Bilbao  
 20 h.: Junulara vespero  
 Libro-Servo 10/12 h.  
 Ekspozicio: 10/13 h. kaj 16/19 h. (\*)
- Vendredo 21an** 9,30 h.: Senpaga bus-vojaĝo al Vitorio. (Nepra antaŭenskribiĝo)  
 11/11,30 h.: Prezento de la venonta Hispana Kongreso  
 12/13 h.: Oficiala fermo de la Kongreso  
 14 h.: Tagmanĝo  
 15,30/17,30 h.: Senpaga ekskurso tra Vitorio  
 18/19,15 h.: Publika kastillingva parolado en Vitorio  
 19,30 h.: Reveno al Bilbao  
 21 h.: Oficiala bankedo ĉe Bilbao-a restoracio  
 Ekspozicio: 10/13 h. kaj 16/19 h. (\*)

- Sabato 22an** 10 h.: Tuttaga senpaga ekskurso al Gerniko. (Nepra antaŭenskribiĝo)  
14 h.: Kolektiva manĝo survoje  
16 h.: Reveno al Bilbao  
18 h.: Promenado tra la malnova Bilbao-a kvartalo kaj adiaŭo en la Grupo Esperantista de Bilbao

(\*) Okazonta kie troviĝas la "AISS" (Str. Gran Vía, 54)

---

## 41a IFEF—KONGRESO Salou 13/19 Majo 1989 GRAVAJ INFORMOJ PRI LOĜADO EN SALOU

---

LKK informas ke, post interkonsento kun hotelistoj de Salou, ni elektis kiel KONGRESEJON, hotelon "Negresco" situatan apud la maro kaj en trankvila flanko de Salou; ĝia kategorio, estas "A" tristela. Malgraŭ sia grandeco, la hotelo ne kapablas gastigi ĉiujn kongresanojn. La unuaj aliĝintoj estos lokitaj en la hotel-Kongresejo ĝis ĝia pleneo; la postaj aliĝintaj kongresanoj gastos en apuda hotelo je 10 minutoj piede de la Kongresejo.

Vid-al-vide de la Kongresejo, ekzistas apartamentoj por gastigo de du, kvar aŭ ses personoj.

Apud la Kongresejo, nur 5 minutojn piede, ekzistas du kampadejoj kun ebleco loĝi en karavano, bangalo aŭ en propra tendo.

La prezo estas jenaj:

En hoteloj (kompleta pensio): indikitaj sur la aliĝiloj.

En hoteloj (nur tranoktado kaj matenmanĝo): Po 250 pesetoj malpli ol la kompleta pensio.

Apartamento por nur 2/4 personoj (nur tranoktado): Po 3.000 pesetoj por unu tago.


Apartamento por 4/6 personoj (nur tranoktado); Po 4.000 pesetoj por unu tago.

Kampadejo (nur tranoktado) en bangalo por 4 personoj: Po 3.000 pesetoj.

Ekzistas aliaj loĝeblecoj en hoteloj de kategorioj "A" kaj "B" en la centro de la urbo, sed malproksime de la Kongresejo.

Se vi deziras loĝi en la Kongresejo, aliĝu sufiĉe frue!!

L.K.K.



ARTAJ, SCIENCAJ KAJ  
KULTURAJ HOROJ  
EN LA KONGRESO DE VALENCIO

La Kongresaj "Horoj" daŭre ricevas kreskantan ŝaton de la gekongresanoj: Fakte, la ĉambroj estis ĉiukaze plenaj, la dialogoj kaj debatoj inter prelegantoj kaj/aŭ ĉeestantoj estis interesaj kaj viglaj, kaj ĉiukaze ĉiuj deziris pli da tempo por diskutado, kvankam pro atento al aliaj eroj de la kongresprogramo ni devis abrupte meti finon al ĉiu debato (malgraŭ tio, ke la tri unuaj "Horoj" daŭris po pli ol unu horon, kaj la kvara eĉ pli ol unu horon kaj duonon).

1) La unuan "Horon" plenigis Alvaro Mellado López, unu el la plej junaj kaj kompetentaj denaskaj esperantistoj hispanaj. Li prezentis al ni unue spritan studaĵon pri kalemburoj en Esperanto ("koleg'o/kol'eg'o, ĉar'mul'in'o/ĉarm'ul'in'o, kaj multaj aliaj), kio eltiris el la ĉeestantaro multajn riĉojn, komentojn kaj demandojn. Kaj li poste regalis nin per sia gaje vigla pianludado, varme dankata de fortaj aplaŭdoj.

Post la koncerto ekĝermis kontaktoj inter pluraj homoj kompetentaj pri muziko aŭ kantado (inter ili, nia usona samideano Sergio Docal) kun celo munti kongresan HEF-ensemblon kiu en la kadro de la "Horoj" prezentu al ni kiel eble plej multajn pecojn de la hispan-amerika folkloro.

2) Miguel Angel Sancho Pardo estis anoncinta sian prezenton de la temo "Aŭtomata tradukado pere de Esperanto en la nederlanda sistemo DLT". Ĉar li ne povis veni al Valencio, mi anstataŭis lin uzante la notojn kiujn li antaŭe sendis al mi.

La teknika parto de la sistemo DLT ne ricevis grandan atenton dum la kolokvo, kaj nur iom pli da atento ricevis la ponto-lingvo de la sistemo (kiu, jam dekomence preskaŭ egala al Esperanto, grade eĉ identiĝas jam al ĝi). La ĉefa diskutado okazis pri la temo, ĉu la elektronika kaj alitipa moderna maŝinaro havas aŭ havos bonan aŭ misan influon al senlaboreco, al homeco, al harmonio socia, k.s.: Evidentiĝis, ke pri tiu afero ekzistas kaj optimistoj kaj pesimistoj el kiuj inter la debatantoj la unuaj estis pli multaj).

3) Alberto Franco Ramírez parolis al ni pri "Tensoj absolutaj aŭ relativaj en subpropozicioj: Diferencoj inter la hispana lingvo kaj Esperanto". La

surprize granda kvanto da ĉeestantoj kaj la vigeleco de la kolokvo ja trudas, ke la "Horoj" insistadu pri altnivela studado de la Internacia Lingvo.

4) La fortan pladon ĉijaran konsistigis la temo "Etiko en politiko".

Nia itala samideano Gian Carlo Fighiera zorgis pri "Enkonduko pri la konceptado de Macchiavelli", kiun li pliriĉigis per informoj pri la historia fono en kiu vivis Macchiavelli, kiel ankaŭ pri rilatoj inter Italio kaj Hispanio en la epoko de la Borĝa familio ("Borgia"). Tia altnivela lekcio — kiu alportis eĉ novan prilumon al homoj kiuj jam konis la Makiavelan verkaron — ricevis merititan grandan aplaŭdon.

Poste venis resuma prezento de la argumentoj de tiuj homoj opiniantaj ke "jes, politiko estas akordigebla kun etiko", jen ke "Ne, tia akordigeblo ne estas ebla". La unuajn argumentojn resumis Manuel López Hernández, kaj pri la duatipaj zorgis prof-ino Rafaela Urueña Alvarez; tian lecion pri opinioj kaj argumentoj de plej elstaraj filozofoj kaj pensuloj oni dankis per forta aplaŭdo.

Pri la debato, kiu sekvis, mi agis kiel moderiganto. Ĝi iĝis intensa, flua; ni ĉiuj volis plu pri debato, sed ni devis ĉesi... ĉar eĉ la pordisto de la Universitato ne povis pli malfrui por pordo-fermo!

La ĝisnuna celo de la "Horoj" estas pliriĉiĝo kultura kaj plispertiĝo lingva de la kongresanaro per ekspluatado de la kultura kapitalo ekzistanta inter la gekongresanoj mem. Sed, laŭ la planita strategio, la "Horoj" devas taŭgi ne nur por tia interna pliriĉiĝo, sed ankaŭ atingi nivelon tian, ke ni povu uzi ilin kiel plian argumentan ilon antaŭ la ne-esperantista mondo.

Kunlaboru por atingo de tia nivelo! Mi varme petas vin ĉiujn, ne hezitu skribi al mi pri viaj sugestoj por plibonigo de la "Horoj", aŭ malvolvo de iu difinita temo, aŭ indiko de adekvataj personoj — ja antaŭ ĉio vi mem — ktp.

Kun persona kaj samideana antaŭdanko, via,

Antonio Alonso Núñez  
Responsulo pri ASKH

Adreso: ESPERANTO — Apartado 714  
15780 — Santiago de Compostela

---

## INTERNACIE

---

**Club Espèranto Rennais:** 9, square de Provence, F-35000 RENNES, organizas Duan Someran Lernejon pri Komputiko: "Enkonduko al dizajno kaj enplantado de programaroj", kiu okazos de la 3a ĝis la 10a de julio, 1988 en BIEUZY—LES—EAUX (Bretonio—FRANCIO). Prezo: 1100 FRF (kurso kaj gastigado en kolektivaj dormoĉambroj). Informoj: ESPERANTO 60, allée de Renaudière F-35510 CESSON—SERVIGNE.

# H.E.J.S.

POSTKESTO 23484 E-08080 - BARCELONO

## JUNULARA SEKCIO DE HEF KAJ LANDA SEKCIO DE TEJO

---



*Foto: Meze, Natxo Apaola-  
za prezidanto de Alava Es-  
peranto-Asocio en Venezia,  
Italujo.*

---

### HEJS - TENDARO

Alava Esperanto Junulara Asocio organizos HEJS-Tendaron en Vitoria la Sanktan Semajnon 1989. La aliĝo estas tute senpaga kaj la organizantoj intencas atingi mal-multekostan restadejon.

Sendu vian aliĝilon al:

A.E.A.

Domingo Beltrán 42, 4°  
01012 Vitoria-Gasteiz  
Hispanujo

---

**NOTO.** La Redakcio de "Bo-  
letín" atendas kunlaboras-  
fojn de la gejunuloj.

Dankon.

**G.M.E**

---



---

# HEF – SIDEJO EN BARCELONO

---

NOVAJ MEMBROJ: José Filera, Pedro José Gonzalez, Fco. José Albertos, José Fco. Martín, Juan Nieto, Francisco Vicente, Montserrat Cobrafiga, Mi-kaelo Malón kaj Iñaki Gauna.

NOVA ESPERANTO-ORGANIZO ALIĜINTA. Esperanto-Fundación "Fernando Soler"

---

## H.E.J.S. –PREZIDANTO

La pasintan 16an de Oktobro, en la sidejo de HEF en Barcelono okazis la HEF-estrara kunveno.

En ĝi partoprenis ankaŭ la delegitoj de la Esperanto-Asocioj: Alava Esperanto-Asocio, Barcelona Esperanto-Centro, Esperanto Grupo Sant Pau d'Ordal, Esperanto Grupo Jozefo Anglés el Sant Cugat, Esperanto-Fako Geava Domo el Manresa, Junulara Esperantista Kataluna Asocio, Kultura Asocio Esperantista kaj Tutmonde.

El la tri kandidatoj proponitaj por la gejunuloj de Hispana Esperanto-Federacio, post la ricevo de la informilo, sendita al ĉiu HEJS-MEMBRO, la HEF-estraro elektis kaj la delegitoj aprobis kiel PREZIDANTON de la junulara sekcio de HEF, (HEJS), fraŭlon:

JORDI FERRÉ. Apartado 23484, E-08028-Barcelono

---

## NACIA LOTERIO N-RO 25.655

Meze de oktobro en la HEF-sidejo en Barcelono, estos je la dispono de la esperantistaro loteribiletoj de la NACIA LOTERIO POR KRISTNASKO.

Ĉiu bileto kostos 100 p-tojn, sed oni priludos nur la nominalan valoron, t.e. 80 p-tojn.

Interesatoj mendu ilin kaj sendu samtempe la sumon. La mendoj estos validaj nur post ricevo de la koncernaj pagoj.

La HEF-estraro kaj delegitoj de la Esperantaj-asocioj, interkonsentis en Madrido, ke la Esperanta-asocioj pagos al la Federacio, post la revendo de biletoj al membroj, nur po 90 p-toj, kaj devos likvidi la konton aŭ resendi la nevenditaj biletojn, antaŭ ol finiĝos novembro.



## NOVA EKZAMENA KAJ DIPLOMA STUD-PLANO POR LA INSTRUADO DE ESPERANTO EN HISPANIO

(Desegnita kaj aprobita de ILEI-Hispanio  
kaj la Instruada Servo de A.E.U.)

---

La kunordigantoj de ILEI-Hispanio (Instrua Sekcio de HEF) kune kun la Instruada Servo de AEU, kunveninte por analizi la eblon reformi la ĝisnunan sistemon de la instruado de Esperanto en Hispanio, alvenis al konsento kaj skizis jenan stud-planon, kiu funkcios en la tuta ŝtato:

### A) UNUA NIVELO: ELEMENTA LINGVO-SCIO.

Praktika branĉo I  
(nur lingvo-scio)

- Esperanta Gramatiko
- Historio de la Movado I
- Esperanta Literaturo
- Esperanta Agado I
- Metodologio de la Instruado de Esperanto I

### B) DUA NIVELO: MEZA

Teorio-praktika  
branĉo I  
(por kursgvidantoj)

Praktika branĉo II  
(nur lingvo-scio)

- Esperanta Lingvistiko
- Historio de la Movado II
- Esperanta Literaturo II
- Esperanta Agado II
- Metodologio de la Instruado de Esperanto II

### C) TRIA NIVELO: SUPERA

Teorio-praktika  
branĉo II  
(por esperantistaj  
instruistoj)

---

Kotizo al I.L.E.I. (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) por la jaro 1988a: 1.200,- (MIL DUCENT) pesetojn.

Skribu al: I.L.E.I., Sol, 75, 41003 SEVILLA.

---

---

# PENSOJ DE ZAMENHOF

---

El la parolado de la Sesaj Kongreso 1910 en Washington  
(Originala Verkaro. pĝ. 393)

Lando de libereco, lando de estonteco, mi vin salutas! Lando, pri kiu revis kaj nun akoraŭ revas multaj suferantoj kaj senkulpaj persekutatoj, mi vin salutas! Regno de homoj, kiu apartenas ne al tiu aŭ alia gento aŭ eklezio, sed al ĉiuj siaj honestaj filoj, mi klinas min antaŭ vi, kaj mi estas feliĉa, ke la sorto permesis al mi, vin vidi kaj spiri almenaŭ dum kelka tempo vian liberan, de neniu monopoligitan aeron.

Saluton al vi, Usono, plej potenca reprezentanto de la nova mondo. Ni, filoj de la malnova kaj maljuna kontinento, venis al vi kiel gastoj; sed ne vidama turismo enŝipigis nin, ne la espero de ia komerca akiro pelis nin al via bordo; ni venis al vi, por alporti al vi novan senton kaj novan ideon, ni venis, por alporti novan kuraĝon al tiuj niaj samideanoj kaj samidealanoj, kiuj ĝis nun laboris inter vi kaj kies vortoj pri ia nova popolo eble ŝajnis al vi tro fabelaj. Peco de tiu miksdevena kaj tamen lingve kaj kore unuigita popolo nun staras antaŭ vi reale kaj vivante. Rigardu nin, aŭskultu nin, kaj konvinkigu, ke ni ne estas fabelo. Ni estas diversgentanoj, kaj tamen ni sentas nin kiel samgentanoj, ĉar ni komprenas nin kiel samgentanoj, havante nenian bezonon humiligi aŭ fremdlingve baibutigi unu la alian. Ni esperas, ke dank' al nia laborado pli aŭ malpli frue la tuta mondo similiĝos al ni kaj fariĝos unu granda homa gento, konsistanta el diversaj familioj, interne apartlingvaj kaj apartmoraj, sed ekstere samlingvaj kaj sammoraj. Al tiu nia laborado, kiu celas krei iom post iom unuigitan, sekve fortigitan kaj spirite altigitan homaron, ni nun invitas vin, filoj de Usono. Kaj ni esperas, ke nia voko ne restos vana, sed ĝi baldaŭ eĥe resonos en ĉiuj anguloj de via lando kaj tra tuta via kontinento.

Nur tre malmultaj el ni povis veni en vian landon, ĉar ni, esperantistoj, ne estas homoj riĉaj; de nia nuna kongreso ni sekve ne povas atendi gravajn decidojn, kiuj havus signifon por la tuta esperantistaro. Ni venis al vi, Usonanoj, precipe por pasigi en via mezo kaj antaŭ viaj okuloj unu semajnon de nia esperantista vivo, por montri al vi almenaŭ malgrandan pecon de tiu vivo, por alporti al vi semon; kaj ni esperas, ke post nia foriro tiu semo potence ĝermos kaj kreskos, kaj en via lando nia afero baldaŭ havos siajn plej fervorajn kaj plej gravajn apostolojn.

# LA U. K. EN ROTTERDAM

**K**iel ĉiujare la tutmonda esperantistaro kolektiĝis por partopreni en la Universala Kongreso de Esperanto.

Okaze de la 80a jariĝo de la fondiĝo de U.E.A. oni elektis kiel kongresurbon, la grandegan havenurbon Rotterdam, naskiĝloko de la fama filozofo Erasmo kaj sidejo de la C.O. de U.E.A.

La 73a Universala Kongreso okazis de la 23a ĝis la 30a de julio kun ĉeesto de pli ol 2.300 gekongresanoj el 63 landoj, kaj se mi devus epiteti ĝin, mi, simple, nomus ĝin trankvila kongreso, kaj al tiu trankvileco ege kontribuis la simpatio kaj bonkoreco de s-ino Bakker, prezidantino de L.K.K. ĉiam preta solvi la problemojn de la plej simpla kongresano.

Raporti pri la kongresaj aranĝoj ne estas facila tasko, ĉar ne eblas partopreni en ĉiuj, ĉar oni devas elekti tiujn kiuj, por vi, estas interesaj; do, mia raporto estas, kiel oni povas kompreni, tute subjektiva kaj, natura, la aliaj hispanaj gepartoprenantoj havos aliajn opiniojn, sed por ĉiuj ĝi estis neforgesebla travivaĵo.

La kongresejo estis la impona konstruaĵo "De Doelen" situanta proksime de la Centra Stacidomo, kie diversaj salonoj, nomataj, laŭ kutime, kun la nomo de elstaraj forpasintaj esperantistoj estis je la dispono de la Kongreso por la diversaj aranĝoj.

Kiel komitatano A por Hispanio mi partoprenis, kun s-ino Urueña anstataŭantino de la alia komitatano s-ro Aragay, en la komitatkunsidoj dum kiuj oni traktis, demokratie kaj konkorde, diversajn temojn utilajn por la bona disvolviĝo de Esperanto kaj, ĉefe, de U.E.A. Tamen, laŭ mi, du problemoj ekzistas por ke la ideoj, multaj el ili bonaj kaj taŭgaj, fariĝu realaĵo: mankas financoj kaj homoj pretaj kaj kapablaj.

La inaŭguro okazinta dimanĉe je la 10a horo en la grandega salono "Zamenhof" kun ĉeesto de la tuta kongresanaro kaj prezidata de d-ro Tonkin, akompanata de la tuta estraro, estis pli intima kaj familia ol kutime, ĉar, laŭ vortoj de d-ro Tonkin mem, aŭtoritatuloj estos marde dum la ferma ceremonio de la Jubilea Jaro.

Post enkondukaj vortoj de d-ro Tonkin per kiuj, i.a., li diris ke "ni venas al Rotterdamo, ĉar en ĝi estas la centro de nia movado, tio estas la C.O. de U.E.A.", salutparolis s-ino Anna Bakker, Prezidantino de L.K.K. kiu per afablaj vortoj bonvenigis nin al la grandega nederlanda urbo.

Sekve, d-ro Haszpra, estrarano de U.E.A. pri scienca agado faris enkondukan prelegon pri "Scienco kaj tekniko por internacia kompreniĝo", kiu estis traktata kiel kongrestemo en diversaj kunsidoj laŭlonge de la semajno.

Post muzika paŭzo okazis la kutimaj salutoj de reprezentantoj el landoj el la kvin partoj de la terĝlobo; por nia Lando, nome de HEF, salutis d-rino Urueña.

La festparolado de d-ro Wells, kiun certe vi povos legi en aliaj esperantaj revuoj, fermis la ceremonion.

Unu el la plej altnivelaj kaj interesaj programeroj de ĉiu U.K. estas la serio da prelegoj, kiujn elstaraj universitataj profesoroj prezentas en la kadro de la nomata Internacia Kongresa Universitato.

Sub rektorado de prof. Knappert, okazis deko da prelegoj, inter kiuj mi partoprenis en tri, la unua de prof. Tonkin pri "Esenco kaj karaktero de la Esperanta literaturo", elstariganta la gravan rolon de Antoni Grabowski, genia tradukinto de la fama pola verko "Sinjoro Tadeo".

La dua, plej grava por ni hispanoj, okazis marde je la 9a horo en Salono Hodler, kie d-rino Rafaela Urueña, universitata profesorino pri Internacia Juro en la Universitato de Valladolid prelegis, elokvente, pri la temo "Victoria kaj Grotius, ĉu du patroj por la Internacia Juro?". La prelego, bone dokumentita kaj tre interesa, altiris la atenton de la ĉeestantaro, kiu je la fino faris al ŝi diversajn demandojn.

La tria, de d-rino Vera Barandovská, temis pri "Internacilingva verko de Komenio en la spegulo de la 17a jarcento".

Laŭ d-rino Barandovská, Komenio plenakordas kun la opinioj de la hispana humanisto Luis Vives kaj kiel homo de sia epoko, Komenio revis pri nova "harmonia lingvo" kiu ne estis plene konstruita lingvo, sed nur projekto, kaj, komsekvence, ni ne devas taksu la verkon de Komenio "Panglotia" ĝia lingvistika verko, sed homa kaj filozofia celo al plia saĝeco (Pansofio) de la homo, unue en ia propra lingvo kaj kulturo kaj poste internaciskale.

La prelego estis ege interesa, sed, bedaŭrinde, ĝi okazis en ne tre taŭga ejo kaj la poroj estis konstante fermataj kaj malfermataj kio estis ĝena por tiuj kiuj volas atente aŭskulti la prelegon.

La artaj aranĝoj, laŭ mia persona opinio, ne estis tre allogaj kaj vere ili ne eniros en la historion de la Universalaj Kongresoj. La Nacia Vespero ne spegulis la muzikon kaj la dancojn de la Lando, sed spegulis nur eble la nuntempan, plej modernan, epokon, kio estis nekomprenebla por multaj el la ĉeestantoj.

Eble, oni devus elstarigi kiel la plej interesajn programerojn la koncertojn de diversaj artistoj el Orienta Eŭropo, kiuj ludis en la Salono Grabowski, inter ili, mi partoprenis en tiu de s-inoj Staneŝnikova kaj Puĥova el Sovetunio. Tamen, neniu el la artistoj altiris la kongresanojn kiel en pasintaj jaroj okazis kiam koncertis la forpasita bulgara baritono Damjanov.

Kompreneble, pluraj kunvenoj kaj kunsidoj okazis laŭlonge de la kongresa semajno kaj inter ili mi partoprenis en tiu pri responsuloj de Landaj Aso-

cioj post interesaj debatoj, oni decidis, de nun, produkti samskizan jaran agadraporton por U.E.A. kaj oni pristudis labordokumenton en kiu oni resumis ĉies proponojn kaj kiu estus utila por la venonta strategio de U.E.A.

La alia reprezentanto de H.E.F. partoprenis en aliaj kunsidoj, interalie, en tiuj pri eksteraj rilatoj, kie oni parolis pri la neceso daŭrigi la agadon en U.N., UNESKO kaj Eŭropa Konsilantaro, I.K.U.E.-kunsido, en la prepar-kunsido por la restarigo de la Internacia Asocio de Juristoj-Esperantistoj kaj en kunveno de A.I.S. de San Marino pri scienca sfero.

La fakto ke la nunjara U.K. okazis en Rotterdam, sidejo de la C.O., bone kontribuis al tio ke la Kongresa Libro servo havis pli grandan kvanton da diversaj libroj ol en aliaj U.K.

Kiel prizorganto de Libroservo de H.E.F. mi plurfoje vizitis ĝin kaj eĉ faris mendojn, inter ili, estas kelkaj el la plej freŝeldonitaj libroj kiel "Jubileo"



(memoriga libro pri la jarcento de Esperanto kaj multaj fotoj) kaj "Laŭdo de l'stulteco" de la roterdama filozofo Erasmo, el la latina tradukita de G. Berveling.

Post tiuj agrablaj tagoj dum kiuj ni laboris, aŭskultis, rigardis, babilis kaj interamikiĝis, venis, kiel ĉio en la vivo, la momento de la fermo kaj por tiu celo, ni, denove, kuniĝis en Salono "Zamenhof" kie prizidate de d-ro Tonkin okazis tiu lasta programero dum kiu, kiel kutime, estis laŭdoj kaj floroj por ĉiuj kiuj, diversmaniere, kontribuis al la sukceso de la Kongreso.

La transdono de simbola kongresa flago al reprezentanto de la venontjara U.K. okazonta en Brighton (Britujo) kaj la kanto de la himno "La Espero" metis finan punkton al la nunjara U.K. sed, ankoraŭ komitatanoj devis labori, dum la deĵorantoj de la kongresejo demetis ĉion, kiu ĝis tiam servis por la komforto kaj plezuro de la gekongresanoj.

L. HERNANDEZ

---

## 6a ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO

---

JEREZ, de la 3a ĝis la 6a de Decembro 1988

### CENTRA TEMO: ESPERANTO KAJ LA INSTRUADA REFORMO KONGRESKOTIZOJ

Kongresanoj: 600 p-toj

Gejunuloj kaj senlaboruloj: 400 p-toj

#### LOĜADO

Residencia Juvenil Jerez. Avenida Carrero Blanco, 30, Jerez de la Frontera.  
Tel. (956) 342 890.

Sendu aliĝilon kaj monon: 6a Andaluzia Kongreso de Esperanto. Apartado 320, 11480-Jerez de la Frontera.

---

### NIAJ GRUPOJ

---

**ZARAGOZO:** FRATECO informas, ke komencis tri kursojn: Unu en la sidejo de Frateco, unu en la sidejo de C.N.T. kaj alia en la Instituto de idiomoj de la Zaragoza Universitato

**SANT CUGAT DEL VALLES:** Preparante la estontan 50an Hispanan Kongreson de Esperanto, la Grupo Jozefo Angles, organizis tri Esperanto-kursojn. La profesorino estas Irene Szanzer el Pollando.

En la kultur-domo de la urbo alvoke por la aŭtuna Esperanto-kurso, la Esperantista Grupo "Jozefo Anglés" okazigis la 2an de oktobro paroladon de Ricard Güell, kiu malvolvis temon pri Esperanto. En kataluna lingvo li klarigis la ideon pri Esperanto kaj faris historion pri la frua movado en Katalunio kaj ĝia restarigo post la milito, speciale pri la Grupo de Esperanto "Cooperativa Teixidors de Mà", la inaŭguro en Barcelono de strato Zamenhof kaj la esperantistaj renkontiĝoj. Post la parolado de Ricard Güell, Trini García Covacho nome de la Esperanto-Grupo "Jozefo Anglés" danke adiaŭis la ĉeestantojn kaj anoncis baldaŭan kurson de Esperanto.

**SABADELL:** KAE, Kultura Asocio Esperantista el Katalunio, komencis elementan kaj superan Esperanto-kurson. Informojn: Centre Civic de la Creu Alta, strato Mayor 70, Sabadell.

Ankaŭ gvidas Korespondan Esperanto-kurson sub la kontrolo de s-ro Luis Serrano, Font Nova 32, 08202-Sabadell.

**TERRASSA:** Tutmonde, Pacifista movado kontraŭ la Perforto, la Mizero kaj la Milito informas, ke kiel tradicie, ekzistos por la venonta jaro nur volontaj kotizoj. Atendas viajn helpojn, la Sekretariato, Apartat 313, E-08220 Terrassa.

### BARCELONO

#### POLAJ GEESPERANTISTOJ VIZITAS BARCELONON

Ĉirkaŭ dudek polaj geesperantistoj alvenis la 4an de julio, 1988, al Barcelono per la rusa ŝipo Schostakovitch en ronvojaĝo Odeso-Barcelono-Mar-sejlo-Napoli-Odeso.

Kelkaj katalunaj esperantistoj akompanis ilin en rapida unutaga vizito al la urbo.

Vespere je la 5a ili vizitis Barcelona Esperanto-Centro, kie ili estis akceptitaj kaj samtempe regalitaj per dolĉaĵoj kaj trinkaĵoj.

F-ino Ursula Reniecka, loka sekretariino ĉe la urbo Opole de Pola Esperanta Asocio kaj la grupestro skribis afablan saluton en la albumo de BEC. Sekve, je la ĝusta tempo la polaj geesperantistoj estis akompanataj al la ŝipo kaj oni adiaŭis ilin. Dum la vizito estis konstatebla la utilo de Esperanto kaj ĝia efiko por la interkompreniĝo inter homoj de malproksimaj landoj kaj diferencaj gepatraj lingvoj.

Manuel Miguel

### MANRESA

#### Agustí Boix Bernat filatele premiita

En la Filatelia Ekzpozicio "EKSP0 — LLUM` 88", 20a februaro ĝis 6a marto, 1988, nia manresana samideano s-ro Agustí Boix Bernat meritis la premion "Club Finuman" pro sia kolekto de Esperantaj poŝtmarkoj.

**MADRIDO:** Grava Tutlanda Esperanto-kunveno en Madrida Esperanto-Liceo. La 22an de oktobro ekde la 10a matene kaj sub la gvido de profesoro Alonso Nuñez el Santiago de Compostela, okazis kunveno en kiu oni analizis la estontecon de la Esperanto-Movado en Hispanio pri: HEF-nova estraro, Universala Kongreso de Esperanto en Valencio, Agado en la Universitatoj, Oficialigo de Esperanto, ktp. ktp.

---

### DEZIRAS KORESPONDI

Ragan Radostaw, 22-jara studento, kun hispanaj geesperantistoj pri historio, kulturo, folkloro, literaturo kaj kastilia lingvo. — ul. Stefana Batorego 7/1 KATOWICE. Pollando. — Esperanto-Klubo Kolombo. HANKUK Universitato por Fremdaj Studoj. C.P.O. Kesto 4258. SEUL 100. Respubliko de Koreio. Por pli efektive propagandi Esperanton, oni volas kolekti leterojn el diversaj terĝlobo-partoj por ilin disdoni al studentoj, kiuj volas interamiĝi Esperante.



KOMANDORO JOAN ESCRIVA

**T**alenta valencia poeto de la 15a jarcento, diplomato reprezentanto de la hispana reĝo, Ferdinando la Katolika, en la Pontifika ŝtato en 1497, alta oficisto de la Aragona Regno. Liaj poeziaj verkoj havas la karakterizajn trajtojn de la Kanzonaroj de tiu epoko, kaj en ili alternis la tradiciaj populara lirikismo kaj la rafinita gusto de la tiamaj kleraj korteganoj.

Liaj verkoj, kiuj aperas en "Ĝenerala Kanzonaro" (1511) kaj en la nun nomata "Suplemento al la Ĝenerala Kanzonaro" (1514), elstaras pro liaj poezia sensiveco kaj la profunda kono de la homa spirito. Li estas aŭtoro de verko en dialogo "Plendo kiun li faras al sia amikino antaŭ Amoro", fakte sentimentala novelo, sed li estas pli konata per poemo, kiu profunde influis la hispanan Literaturon (Cervantes, Lope, Calderón, Gracian, ktp.).

Jen la menciita poemo:

"VENU, MORT', TIEL KAŜITE"

*Al la morto.—*

*I*

*Venu, mort', tiel kaŝite,  
ke mi ne sensu ĉin veni,  
por ke la plezur' ĉin teni  
ne vivigu min devige.*

*Venu, kiel vunda fulmo  
ke, ĝis kiam ĝi ja vundas  
ne sonas la bru' profunda  
por trafe fari la vundon.*

*Estu ĉia veno tiel,  
se ne, mi ja min devigas,  
ke nia renkont' ĝojiga  
revivigos min devige.*

*II*

*Vi, mortigas kun allogo,  
kaj kun tiel glora peno,  
ke ne estas fenomeno  
pli dolĉa ol mia morto.*

*Kaj mi fieras pri tio,  
tiel ĉagrene kontentas,  
ke tiun senton turmentan  
mi ne ŝanĝus por alio.*

*Kaj decidis mia sorto  
doni al mi penon tiel gloran,  
ĉar nenion mi pli adoras  
ol la sinkojn de mia morto.*

Cervantes reproduktis, iom modifitaj, la unuajn versojn de tiu ĉi poemo de Escrivá (Quijote 2a, ĉapitro 38a), kaj Calderón de la Barca ankaŭ "profitas" de la samaj versoj en la verko "La plej granda monstro, la ĵaluzo". Kiel ni jam indikis, ankaŭ aliaj famaj verkistoj ricevis la influon de tiu bela poemo.

**Antonio Marco Botella**  
Zaragoza, majo 1987

## BARCELONO, URBO DE LA OLIMPIAJ LUDOJ EN 1992

**L**a esperantistoj devas esti pretaj por bonvenige akcepti la multnombrajn esperantistojn, kiuj vizitos Barcelonon okaze de la Olimpiaj Ludoj en 1992.

La Olimpiaj Ludoj, restarigitaj en 1986 kaj okazintaj en Ateno, estas heredaĵo de la antikva helena aŭ greka civilizacio. Ili havis religian signifon honore al Zeŭzo kaj aliaj dioj de la helenoj kaj okazis ĉiujn kvaran jarojn. La antikva Grekio tiam konsistis el diversaj sendependaj urbo-ŝtatoj, kiuj ofte militadis inter si, sed dum la Olimpiaj Ludoj fariĝis militpaŭzoj, dum kiuj la multnombraj vizitantoj povis neĝenate trairi la diversajn ŝtatojn kaj la atletoj-reprezentantoj de la urbo-ŝtatoj povis libere konkursi. La venkintoj estis honorataj per kronoj el olivujaj folioj. Grava estis la ĉeesto kaj la partopreno en tiu festo honore al la komunaj dioj.

Ni deziras, ke la Olimpiaj Ludoj en Barcelono estu tutmonda festo de konkordo kaj paco, kaj ke la partopreno en ili, tiel same de la atletoj, kiel de la vizitantoj, estu senigita je naciismoj kaj negoca spektaklo.

Ni esperantistoj devas profiti la kvarjaran tempon por ke nia esperanta lingvo tiam bone fluu por la bona akcepto al la multnombraj esperantistoj vizitantaj tiun duoblan feston de kunvivado en la Olimpiaj Ludoj kaj en nia esperantisma etoso.

G.M.E.



## DEKLARACIO

de la Honora Patrona Komitato de Universala Esperanto-Asocio

**JE LA OKAZO** de la 100-jara Jubileo de la Internacia Lingvo Esperanto,

**Notinte** la inviton de Unesko al siaj membroj, partopreni en la festado de tiu Jubileo,

**Rimarkinte** ankaŭ la grandan atenton, kiun Esperanto nuntempe ricevas, en la gazetaro kaj inter la intelektularo kaj ĝenerala publiko tra la tuta mondo,

**Ni, sciencistoj, lingvistoj, politikistoj, diplomatoj kaj verkistoj, Okupinte aŭ okupante** respondecajn postenojn en la publika vivo de niaj respektivaj landoj,

**Spertinte** la neceson de komuna lingvo en internaciaj rilatoj por interkompreniĝo, paco kaj evoluo,

**Lerninte** Esperanton, kaj provinte ĝiajn kapablojn dum multaj jaroj,

**Deklaras**, ke Esperanto estas ne nur — pro sia simpleco, logiko kaj tuta strukturo — lingvo taŭga por ĝenerala lernado kiel dua lingvo por ĉiuj, sed ke ĝi jam fariĝis lingvo per kiu ni povas esprimi precize niajn pensojn en niaj propraj fakoj, kaj samtempe la riĉan kaj nuancitan pensadon de la literaturo, kaj

**Tial** ni rekomendas al registaroj kaj kompetentaj aŭtoritatoj kaj instancoj en ĉiuj landoj, same kiel al la sekretariatoj de interregistaraj kaj neregistaraj internaciaj organizaĵoj, kaj al ĉiuj profesiuloj, ke ili mem lernu la Internacian Lingvon kaj ebligu ĝian enkondukon en la lernejojn de la mondo.

Septembro 1987

---

## INTERNACIE

### “PACA ONDO” en USSR.

Laŭ iniciato de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj enkadre de tutmonda kontraŭmilita agado “PACA ONDO” en multaj urboj de USSR okazis la 1a Internacia Ekologia Labortago (INTERKOL—I). Ĉefa celo de INTERKOL—I en Moskvo (24-25.10.1987) estas Ŝtata natura nacia parko “Losinij ostrov = Alka insulo”.

Ili diras: “Venis tempo kiam ĉiuj popoloj devas unuiĝi por savi pacon kaj vivon sur la Tero. Al tio, laŭ opinio de sovetaj esperantistoj, povas kontribui Internaciaj Ekologiaj Labortagoj, organizataj samtempe sur la tuta planedo sub slogano “TERANOJ, VIA DOMO ESTAS EN DANĜERO, UNUIĜUI”, kaj uzo de Esperanto kiel labora lingvo”.

## GRAVA AVERTO

I.L.E.I. (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), kiel sekcio de HEF (Hispana Esperanto-Federacio), intencas oficialigi KOLEGION DE PROFESOROJ DE ESPERANTO, oficiale rekonita de la ŝtato. La Ministerio pri Edukado petis de ni kelkajn dokumentojn, kaj do ni bezonas tre urĝe sciiĝojn de tiuj esperantistoj, kiuj havas ian diplomon —ne gravas la nivelon— pri Esperanto, aŭ de tiuj esperantistoj, kiuj gvidis aŭ gvidas E-kursojn, kaj deziras esti membroj de la estonta Kolegio. Bonvolu, se vi estas en tia situacio, sendi al ILEI (Sol, 75, 41003 SEVILLA) viajn:

- kompletan nomon
- adreson
- identigan numeron (D.N.I.)

Ĉi tiu afero estas tre grava por la oficialigo de la instruado de Esperanto en Hispanio.

---

**Luis Serrano Pérez.** Font Nova 32. 08202 SABADELL

PERAS POR ABONOJ AL "HEROLDO":

La abono al "HEROLDO" por 1989 kostos 1.800 p-tojn. Anonceto 25-vorta 700 p-tojn. Du anoncetoj sinsekvaj rajtas trian senpagan.

KAJ KOTIZOJ AL "MEM":

Mondpaca Esperantista Movado (MEM) kaj Hispana Esperantista Asocio "Antón Balagué" 1.500 p-tojn.

## DEZIRAS KORESPONDI

---

—Kun geknaboj, hungaraj lernantoj, 13-jaraj. Volas scii pri via lando Hispanio. Szuromi Sándor. EGER. Kákócei, út 54 8/26. H-3300. Hungario — Wuska Márk. EGER. kakócei út 62 3/11. H-3300. Hungario. — Du bulgaraj virinoj pri karakterizaĵoj, vivmaniero, karakteroj, naciaj moroj kaj kutimoj de Hispanio. Penka Antonova. ul. Daskal Manol 1, vh. 6. 1606 SOFIA. Bulgario — Natalija Maĝarova. Kompl. MLADOST—1 bl. 75, vh, 2 ap. 48. 1184 SOFIA. Bulgario. — Komencanto, 40 jaraĝa. Matematikisto-programisto ĉe universitato. Ŝatokupoj: historio kaj filatelio. Miĥajlec Boris. Gogkij str. 84/3. 29.4000 UĴGOROD. Soventa Unio — Kun lernanto aŭ lernantino, hungara lernantino. 15-jara. Kolektas markojn kaj buŝtukojn. Boglóska Fehér. KECSKEME'T—6000. Petöfi s.v. 4. II. e. 32. Hungario.—

## LINGVA PROBLEMO EN LA EŬROPA KOMUNUMO

---

Sendube la dek-du nacioj kiuj formas la Eŭropan Komunumon partoprenas en multaj komunaj tradicioj kiel heredintoj de civilizacio greka-romana kaj juda-kristana religio, sed samtempe ili havas malsimilajn karakterizaĵojn kiuj malhelpas supernacian integriĝon.

La plej konfliktema el ĉiuj malsamecoj estas plurlingveco. Krom la naŭ oficialaj idiomoj (angla, dana, franca, germana, greka, nederlanda, itala, kastila kaj portugala) aliaj minoritataj lingvoj estas parolataj de pli aŭ malpli da homoj, ene de la sama EK, kaj ili batalas kun malsama ŝanco por ke ili estu agnoskitaj interne de la propra lando al kiu ili apartenas. En Hispanio estas same oficialaj en la respektivaj aŭtonomaj komunumoj aŭ regionoj eŭskera, galega kaj kataluna. Male minoritataj lingvoj ne estas agnoskitaj en aliaj landoj sed tamen ili estas parolataj de la etnaj grupoj, ekz piamonta, slovena, sicila kaj sarda en Italio; okcitana, bretona kaj korsa en Francujo; galea en Irlando, kimra en Britujo, frisa en Germanujo, ktp.

Tiu babelo signifas ke en la komunumaj organizaĵoj pli ol la triono de la funkciistoj laboras pri lingvaj aferoj. Kiom da tempo kaj da mono kostas la diverslingveco en la EK? Probable tre alta sumo sed ankoraŭ pli grava estas la baro kiu malfaciligas la interrilatojn de la diversaj popoloj.

Kvankam leĝe la naŭ lingvoj havas rajtegalecon, fakte unu el ili, la angla trudiĝas super la aliaj kaj aliformiĝas en "lingva franca". Iom post iom ĝi gajnas terenon al la aliaj, malgraŭ ke ili rezistas, precipe la franca kiu ne vane estis diplomatia lingvo kaj la plej lernata eksterlande ĝis la unua mondmilito.

Kompreneble oni serĉas solvi la gravan problemon kiun prezentas plurlingveco interne de la Komunumo. Kaj ĝenerale oni konsideras taŭga rimedo la agnoskon de unu lingvo kiel komunikilo aŭ pontolingvo por ĉiuj loĝantoj. Sed tio estas grava decido kiun ne devas sankcii la registaroj ne pripensinte profunde kaj ne diskutinte publike, ĉar, kiel ofte okazas, la afero ebligas pli ol unu solvon.

Aprobi la anglan kiel ponto-lingvon por la tuta Komunumo estas decido graveda je gravaj sekvoj, kaj prezentas, inter aliaj, jenajn rezultojn.

a) Evidenta altrudo de angla-saksa kulturo, ĉar unu lingvo estas ne nur komunikilo sed ankaŭ vehiklo de etikaj kaj estetikaj valoroj propraj el ties lingvo. Ni trovigus antaŭ simila kazo kiel Sovetunio kun la rusa lingvo rilate al aliaj socialismaj respublikoj kiuj havas propran kulturon kaj parolas propran lingvon.

b) Asigni senkoste al la angla-lingvanoj multajn privilegiojn, ekzemple:

— Ili estus la nuraj nedevigataj civitanoj lerni fremdajn lingvojn, povante esprimiĝi en gepatra lingvo; ili povus paroli anglan pli perfekte ol aliaj kunparolantoj kiuj male devus dediĉi multegon da tempo kaj multegon da mono por lerni fremdan lingvon plibone aŭ malplibone sed ĉiam en malfavoraj kondiĉoj.

— Harigi geinstruistojn kaj eĉ lemolibrojn por uzado de 320 milionoj da homoj. Eble la nombro de la lernejoj en Britujo multiĝas. Pro tio la lingvo estus por la angloj la ĉefa sksport-industrio.

Ĉu eblas decidi alie pri tio? La respondo estas tute jesa. Forigo de la cititaj malfacilaĵoj estus ebla, plenrajte, pere de Esperanto, kiel vera help-lingvo laŭ la sekvo, ĉar inter nacia lingvo montras jenajn avantaĝojn:

1a. Kiel racia lingvo, Esperanto estas facile prononcebla, gramatike logika kaj sekve, pli facile lernebla ol naturaj lingvoj.

2a. Esperanto apartenas al neniu sed al la tuta homaro kaj pro tio ĝi estas same atingebla por ĉiuj; pere de Esperanto ni ĉiuj aliformiĝus en mond-civitanoj. Neniu sentus sin humiligita aŭ privilegiita.

3a. Ĝia servado laŭlonge unu jarcento kaj ĝia uzado fare de esperantistoj de la tuta mondo apartenantaj al la plej diversaj kulturoj garantias ĝian taŭgecon tiel por esprimi la plej altajn sentojn kiel por transdoni sciencajn kaj teknikajn sciindaĵojn. Granda amaso da libroj verkitaj originale esperante aŭ tradukitaj, pruvas nerefuteble ĝian utilecon por tiu celo.

4a. La aprobo de eŭropaj aŭtoritatoj firmigus la rolon de Esperanto, kiel internacia lingvo, kiu jam prezentas nun solvon kaj samtempe estus grava instigo por ke aliaj landoj ekster EK farus la samon, kio signifus gigantan paŝon por atingi efikan rimedon por la interkompreniĝo de la tuta homaro.

Ankoraŭ eblas ke la komuna saĝo konvinku la registarojn komenci profundan kaj ampleksan studadon de tiu grava afero por decidi poste tion, kio pli konvenas al la ĝenerala intereso de la popoloj, ne trudante unu al la aliaj sed en rajt-egaleco.

Pío Moa Banga

---

## DEZIRAS KORESPONDIS

Wienia Pacwa. 24-jara, studentino de farmacio kaj medicino en Varsovio. Ŝatas literaturon, arton kaj muzikon kaj interesiĝas pri sia estonta profesio. Kun geesperantistoj. 02-956 WARSZAWA. Królewicza Jakuba 22. Pollando. — F-ino Valentina Boklan. 16-jara. Interesiĝas pri filologio kaj kolektas bildkartojn. Loĝas en Kievo, ĉefurbo de Soveta Ukrainio. Sovetunio 252216 KIEVO-216. S. de Herooj de Stalingrado 37 kb. 89. Boklan Valentina.

# EL POPOLA ĈINIO

Abonvarba periodo por 1989, ĝis la 28an de februaro  
ĉiuj kiuj abonas aŭ reabonas "El popola Ĉinio" en la  
abonvarba kampanjo, ricevos belan koloran kalendaron.

## Abontarifoj:

1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
1.200 pst.	2.000 pst.	2.900 pst.

Senpagan specimenon de la revuo E.P.Ĉ. ni sendas laŭ peto.  
Sendu vian nomon kaj adreson kune kun via abonpago al nia  
peranto

S-ro Felix Gómez Martín, c/ Corbeta, 8, 5º A. 28042 Madrid

**Atentu la reabontoj!** por daŭre ricevi seninterrompe la revuon,  
renovigu la abonon antaŭ ol ĝia finiĝo.

Dankon



Libroservo de HEF. Poŝtkesto 119.  
47080 – Valladolid

*FERNANDO DE LA PUENTE*



**EL DOCTOR "ESPERANTO"**

*L. L. ZAMENHOF*

*APOSTOL DE LA PAZ*

Mendebla ĉe: Libroservo de HEF. Poŝtkesto 119. 47080 – Valladolid  
Prezo 1.500 pesetoj